

ESPERANTISTA DOKUMENTARO. — LINGVA KOMITATO N^o 3.

PREZO : 25 centimoj

PRI LA PARTICIPA SUFIKSO

ANTAŬ VERBA FINIGO

I

La prezidanto de la Lingva Komitato ricevis de S-roj J. F. Twombly (komitatano), D. O. S. Lowell kaj Edw. K. Harvey, unuaflanke baj de S-ro Gaston Moch (komitatano), aliparte, la jenajn leterojn, koincide skribitaj la saman tagon, kaj pri kies enhavo li petas la komitatanojn sciigi al li sian opinion.

La prezidanto :
E. BOIRAC.

II

A. — *Letero de S-roj Twombly, Lowell kaj Harvey*

Al la lingva Komitato.

Boston, la 22-an de aprilo 1907.

Estimataj Sinjoroj.

Ni proponas al vi la jenon :

Oni povas uzi anstataŭ la formojn "estas amata", "estas aminta", "estas aminta", k. t. p., la simplajn formojn "amatas", "amitas", "amintas", k. t. p., (Bonvolu vidi en la *Revuo*, N^o 8, la respondon de D^{ro} Zamenhof, n^o 15). Tri apartaj personoj elpensis tiun solvon tie ĉi en Unuigitaj Ŝtatoj : neniu el ili skribis al D^{ro} Zamenhof pri ĝi.

Kun respekta saluto.

J. F. TWOMBLY, A. B., L. L. B., ĉef-redaktoro de la Amerika ĵurnalo, ano de la Lingva Komitato.

D. O. S. LOWELL, intruisto de la Roxbury'a Latina Lernejo, Bostono, Vicprezidanto de la Boston'a Esp. Soc.

Edw. K. HARVEY, A. B., instruisto en la Perkins Instituto por la Blindulsj, sekretario de la Bostona Esp. Soc.

B. Letero de S^{ro} Moch.

Al S-ro prezidanto de la lingva Komitato.

Parizo, 22-an de aprilo 1907.

Estimata sinjoro prezidanto.

La oka numero de la Revuo enhavas (sur pago 377-a) la jenan "Respondon" de D-ro Zamenhof:

La formoj

"amatas", "amitas", ktp., anstataŭ "estas amata" "estis amata", per si mem ne prezentas ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen se la privataj aŭtoroj per sia *propria* iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se "as", "is", k. t. p., signifus "estas", "estis"; sed, kvankam pli au malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo "esti", tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas."

Tiu noto naskas du gravajn rimarkojn, unu faktan kaj unu principan, kiujn mi sentas la devon prezenti al vi, kaj, se vi permesos, per vi al la Komitato.

* * *

Jam de longa tempo mi renkontis en mia korespondado la aluditajn verbajn formojn. Ŝajnis al mi, ke ili estas mirinde oportunaj, tute konformaj al la spirito de nia lingvo, kaj ke la sola riproĉo farebla, pri ilia uzado, estas, ke oni ne elpensis ilin de l'komenco. Mi intencis do demandi la Komitaton, ĉu ĝi konsentas tiun mian opinion; kaj nur la manko de tempo malhelpis min prezenti mian demandon, cetere flankan. Sed nun, ĝi estas prezentita de D-ro Zamenhof mem, kaj devas do estis solvata kiel eble plej frue, ĝi estu nur pro ĝentileco al li.

Mi parolu unue pri ĝia fakta flanko.

La unua libreto eldonita de D-ro Zamenhof en 1887 kaj represita en la *Fundamento*, ne enhavas aktivajn kunmetitajn formojn. Ĝi tradukas "vi faris" per la du francaj esprimoj kiuj signifas "vi estis faranta" kaj "vi estas farinta"; kaj ĝi ne aludas la pluskvamperfekton, aŭ tempon antaŭestintan "vi estis farinta". Same, ĝi donas ne niun tradukon por la ideoj "vi estos farinta", "vi estos faronta", "vi estus farinta", "vi estus faronta", "esti farinta", "esti faronta"

Pri la pasivaj formoj, ĝi diras nur ke ili konsistas el kunmetaĵoj

de l' verbo " est " kun la estantea au estinte a participo pasiva. Oni notu ankaŭ ke ĝi forgesas la estontecan participon.

Jam redaktante post unu jaro sian *Duan Libron* (kiu, kun posta *Aldeno al la Dua Libro*, estas la altinteresa ĝermo de l'*Ekzercaro*), la aŭtoro sentis ke la simplaj tempoj ne sufiĉas; kaj, en la 5-a ekzercaro de tiu *Dua Libro*, troviĝas la frazoj " mi estis fininta ", " li estos veninta ", " se ili estus dirintaj la veron, ili ne estus nun punataj ". Videble estas, ke li kreis tiujn novajn formojn, tute logike, laŭ simileco kun la pasivaj, tiamaniere ke la lingvo posedu nur unu helpverbon.

Ĉe diversaj personoj, la uzado de la kunmetitaj formoj renkontis iom da malbonvolo. Certe estas, tamen, ke ili estas necesaj: la lasta ekzemplo ne povus esti anstataŭata de « se ili dirus la veron, ili ne estus nun punataj », kies senco estus tute alia. Eble oni povus diri « se ili antaŭe dirus », sed — supozite ke la senco estus tute sama, kion mi ne kredas — tio estus nur alia, pli mallerta formo de kunmetita tempo.

Mi ĉiam opiniis ke, ĉar estas ja necesege havi la eblecon esprimi la nuancojn al kiuj respondas la kunmetitaj tempoj, la kontraŭstaro, kiun renkontis tiuj tempoj, devenas nur de iliaj formoj. Nekontraŭdireble estas, efektive, ke ili estas multpezaj kaj malbelaj pro tio, ke Esperanto posedas nur unu helpverbon, dum la ceteraj lingvoj uzas, ĉia, kelkajn: kiam kelkaj el ili troviĝas en unu sama frazo, la efekto estas vere malmalgraba. Oni komparu la suprecititan ekzemplon kun ĉi tiu: « Se ili dirintus la veron, ili nun ne punatus »: kiel pli vigla, bonsona kaj eleganta estas tiu lasta frazo!

Parolante pri tiu kun sperta profesoro, mi ricevis la respondon, ke tiuj formoj konplikigus nian gramatikon kaj estus malfacile instrueblaj.

Tion mi tute ne kredas. Tre facile estas, kontraŭe, ilin komprenigi. Oni bezonas nur memori ke la vico de la vortoj povas esti ŝanĝata, tiamaniere ke la esprimoj:

estas amata, estis amata, estas amita, estis aminta, ktp.,
estu anstataŭataj de la esprimoj:

amata estas, amata estis, amita estis, aminta estis,
kaj ke, skribante ĉi tiujn sub la formoj:

amat (a-est) as, amat (a-est) is, amit (a-est) is, amint (a-est) is,
oni ekvidas, ke ĉiuj kunmetitaj tempoj enhavas la silabojn « a-est », kiuj estas nur senutila balasto; kaj, forĵetante tiun balaston, oni ricevas la kuntiritajn, oportunajn formojn:

amatas, amatis, amitis, amintis, ktp.

Al la uzo de tiuj vortoj, D-ro Zamenhof faras, kiel oni vidis, nur unu teorion kontraŭparolon, nome, ke ĝi implikas la kondiĉon, ke « as », « is », kc., devus signifi « estas », « estis », kc.

Tie kuŝas, laŭ mi, konfuzo, kiun, mi estas certa, nia majstro tuj konfesos, kiam oni estos rimarkiginta ĝin al li.

Se la demando estus pri substantivaj au adjektivaj radikoj, li estus tute prava. Por ke oni havu la rajton diri « mi patras, mi pravas, mi certas, necesas », estus necesege, ke la finiĝo « as » ricevu la sencon de la plena verbo « estas ». Kaj mi rapidas diri, ke tio estus vera ŝanĝo en la lingvo, kaj ŝanĝo tute malaprobinda; unue, ĉar tiuj vortoj « as, is, os, us, u, i, anta, inta », kc., estas tiel neutilaj, kiel malbelaj; kaj precipe, ĉar ili estas tute arbitraj, memorigante la volapuk'ajn vortojn.

Sed la demando ne estas pri substantivaj au adjektivaj radikoj, sed pri participaj. Kaj la doktoro forgesis ke, kvankam la participoj havas ian similecon kun la adjektivoj, similecon al kiu ili ŝuldas sian internacian nomon kaj sian esperantan finiĝon « a », ili tamen *ne* estas adjektivoj, ili estas *verabaj modoj*, kaj enhavas, kiel tiaj, la ideon de tempo (montratan en Esperanto de la literoj *a, i, o*), t. e. la ideon de esteco. Ne estas do bezone ke la sufiksoj « as », « is », kc., signifus « estas », « estis », kc., por doni, aldonite al la participoj, verban formon, ĉar tiuj formoj, enhavante la silabojn « ant » « it », kc., estas ja jam verbaj.

La kontraŭparolo farita al la formoj « bonas », « necesas », « rajtas », kc., estas do tute prava; sed ekzistas nenia taŭga argumento kontraŭ la formoj « amatas », « amantus », kc. Regule kunmetite, ili « prezentas nenian rompon », t. e., ili estas tute konformaj al la spirito de Esperanto; kaj, estante uzindaj, ili estas uzeblaj.

* * *

Sed la demando naskas, kiel mi diris komencante, principan rimarkon, kiu estas, laŭ mi, de ĉefa graveco.

D-ro Zamenhof, konstatinte ke la diritaj formoj « prezentas nenian rompon », aldonas ke, « se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi ». Alivorte, aprobante mem tiun uzon, li akceptos ĝin nur se ĝi estos akceptita de la Lingva Komitato: li antaŭmetas al sia aŭtoritato tiun de l'Komitato.

Tion mi ne povas akcepti. Kaj mi estas certa, ke sufiĉos atentigi pri ĝi niajn kolegojn, por ke ili opiniu same.

Kiel mi skribis en *Lingvo Internacia* (1-a de julio 1905):

« Ni havas la lingvan aŭtoritaton, la solan, kiun ni povas nuntempe

akcepti : nian majstron, D-ron Zamenhof. Li sola povas diri, kio estas la vero kaj la bono pri *sia* lingvo (kelkaj, ŝajnas, forgesas ke Esperanto estas la lingvo de D-ro Zamenhof!).

« Sed li ne povas fari ĉion, unue pro manko de tempo, ĉar la tasko fariĝas ĉiam pli kaj pli grandega; due, ĉar li estas homo, kaj ne posedas do sciencon universalan. Li bezonas do helpadon por la tasko ĉiutaga, kaj konsilojn de teknikistoj por la kreo de la vortoj teknikaj. Sed nur konsilojn li bezonas kaj povas akcepti, ne decidaĵojn devigajn: en okazo de dubo, li sola povas decidi. La komitato, laŭ mi, devas do esti nenio pli, ol *grupo da sekretarioj*, kiujn li bezonas, por plenumi taskon superantan la fortojn de unu homo. Kaj tion mi proponas montri, nomante la komitaton ne *centra*, sed *kelpa*. »

Mi estas konvinkita ke la unua Kongreso, kiam ĝi aprobis la kreon de la Lingva Komitato, kun implika promeso apogi ĝian agadon, kaj la komitatoj mem, kiam ili akceptis partopreni en tiu agado, aprobis tiun principon, ke la Komitato havas la taskon helpi D-ron Zamenhof, ne uzurpi lian rolon. Mi, persone, ne volus resti unu momenton ĝia membro, se tiu mia konvinko estus malprava.

Cu ne estus ridinda la hipotezo, laŭ kiu, en tiu Komitato de 94 membroj, D-ro Zamenhof havus nur unu naŭdekkvaronon de la tute influo?

Do, li komisiu nin esplori vere dubajn *faktajn* demandojn, por kies studado la tempo au eĉ la teknika kapableco mankas al li, kiel ekzemple la komparon de la diversaj vortaroj, aŭ la elekto de teknikaj vortoj. Sed, kiam la demando estas pri la principoj mem de la lingvo, kiam ĝi estas, scii ĉu tiu au tiu esprimo « prezentas rompon », ĉu ĝi estas, aŭ ne, konforma al la spirito de Esperanto, kiu povus respondi, se ne la glora elpensinto, kiu estas la spirito mem de Esperanto? Kiu kuraĝus kontraŭparoli, kiam li eldiris sian opinion?

Pri la « participa sufikso antaŭ verba finiĝo », la Lingva Komitato havas do, laŭ mi, nenion por « aprobi » aŭ « malaprobi ». Ĝi povas nur « konstati » ke, laŭ la klarigoj donitaj de D-ro Zamenhof, la formoj « amatas », « amitas », ktp., (sed *ne* la formoj konsistantaj el verba finiĝo post *substantiva* au *adjektiva* radiko), prezentas nenan rompon en la lingvo, kaj estas do uzablaj. Kaj mi ripetas ke, pro la ĝentileco ŝuldata al la D-ro, tiu konstato ne devas esti prokrastata.

Kun la peto, ke vi bonvolu komunikigi ĉi tion leteron al niaj kolegoj, demandante ilin pri ilia opinio, mi prezentas al vi, S-ro prezidanto, la certigon de mia plej alta estimo.

GASTON MOCH.

III

Respondaj leteroj, cititaj en la ĉi suba raporto.*A. Respondo de S^{ro} Borel.*

Post legado de la rimarkinda kaj tre valora raporto de Sinjoro Gaston Moch pri la transskribo de propraj nomoj, kiu — mi ne dubas — efike kunhelpos por forigi la nunan ĥaoson devenantan de tiu ĉi malfacila demando, mi devas konfesi, ke mi kun malpli da plezuro legis la proponon pri la participa sufikso antaŭ la verba finiĝo.

Mi opinias, ke la enkonduko de tiu novaĵo estus bedaŭrinda eraro. Tiu ĉi proponita formo ŝajnas al mi kontraŭnatura kaj ne konforma al la spirito de nia lingvo; kvankam laŭ D-ro Zamenhof, ĝi ne prezentas « rompon » en la lingvo, ĝi tamen estas grava ektuŝo de la Fundamento de Esperanto.

Unu el la plej valoraj ecoj de Esperanto estas, ke ĝi respektas kiel eble plej multe la lingvajn « tradiciojn » de la naciaj idiomoj kaj dank' al tio ĝi fariĝas baldaŭ kutima al la lernanto. En la plimulto de la modernaj lingvoj la pasivaj formoj de la verbo kaj la kunmetitaj tempoj estas formataj per helpaj verboj. Se Esperanto forĵetos tiun ĉi principon, ĝi apartiĝos en tiu ĉi grava punkto de la naciaj lingvoj kaj kreos novaĵon, al kiu oni nur tre malfacile kutimos.

Tio ĉi precipe rilatas al la pasivaj formoj. La esperantaj verbaj finiĝoj *as, is, os, us*, same kiel iliaj respondaj finiĝoj en la naciaj lingvoj, laŭnature naskas en la spiriton ideon pri aktiva ago. La esprimoj : « mi amatas », « li kredatis », « vi laŭdatos » tute ne donas impreson de pasiva signifo, ili estas kaj longe restos por lernanto konfuzigaj kaj malfacile kompreneblaj, dum la formoj : « mi estas amata », « li estas kredata », « vi estos laŭdata », kiuj respondas al la nacia kutimo, elvokas tuj klaran ideon.

Eĉ post multa ekzercado estas certe, ke oni ĉiam momenton ŝanceliĝos pri la preciza senco de tiaj kuntiritaj formoj : « mi batitos, « mi batotis », « mi batintos », « mi batontis »; ĉu ne pli rapide kompreneblaj estas la formoj : « mi estis batota », « mi estos batita »... k.t.p. ?

Se Esperanto estus difinita ekskluzive por scienculoj kaj lingvistoj, la afero estus tute alia, sed ni ne forgesu, ke Esperanto celas fariĝi popola idiomo facile lernebla ankaŭ de nekleruloj, kiuj scias nur sian patran

lingvon kaj por kiuj ĉio, kio deflankiĝas de ĝi estas barilo por la komprenado.

Oni diras, ke la proponitaj kuntiritaj formoj estas pli *simplaj*, tio estas nur ŝajna simpleco; ili kontraŭe estas tute malsimplaj, ĉar kunmetitaj el multaj elementoj diverssignifaj en unu sola vorto.

Por pravigi la enkondukon de la nova formo oni aludas ĝian bonsonnecon; tio estas persona opinio kaj dependas de la vortoj: « mi irintis », « mi batotos » estas malpli belsonaj ol « mi estis irinta », « mi estos batota ». Se kiel sola profito restas la mallongeco, mi opinias, ke oni ne havas la rajton, oferi por ĝi la tujan kompreneblon.

Mi estas eks-velapükisto kaj memoras la gravan malfacilecon en la lernado kaj instruado de la kuntiritaj verbaj formoj (« palöfob », « pelöfob », « polöfob » — « mi amatas », « mi amitis », « mi amatos »). Ĉio ĉi estis tre bela teorie, sed praktike ĝi montriĝis por la granda amaso tute netaŭga. Ni ne forgesu la instruojn de la historio, kaj ni ne refaru la samajn erarojn kiel Volapük, kiu mortis pro ili kaj pro la plibonigistoj.

Se oni volas malobei la principon de la netuŝebleco de la Fundamento, tiam, laŭ mia opinio, estus ŝanĝoj pli utilaj, pli logikaj kaj malpli danĝeraj por fari ol tiu ĉi.

Sed la demando estas scii, ĉu la Lingva Komitato havas la rajton fari tiun ĉi ŝanĝon sen antaŭa principa decido, ĉu on volas ektuŝi la Fundamenton.

JEAN BOREL.

Berlino, le 2-an de julio, 1907.

B. Respondo de S^{ro} Inglada.

La propono pri la participa sufikso antaŭ verba finiĝo havas unu malgravan utilon kaj kelkajn tre gravajn malutilojn.

La utilo (ĉu oni povas tion nomi utilo?) jen estas, ke per la kuntiritaj kaj strangaj formoj « amantas », « amintas », k. c., oni ŝparas malgrandegan nombron da literoj en la konstruo de la frazo. Gravega kaj ŝatinda utilo! Ekzemple: la frazo « mi estas traleginta, korektinta kaj resendita la tekston » enhavas du literojn pli ol la frazo: « Mi tralegintis, korektintis, kaj resendintis la tekston ».

La malutiloj de la propono estas multaj.

La *klareco* nenion gajnas per la pritraktita reformo. Dum interparolado la formoj *estas aminta* k. c. estas pli facile uzeblaj kaj klaraŭdeblaj, ol « mi amintas » k. c.

La *simpleco* de la lingvo multe perdus per la akcepto kaj efektivigo de la propono. Ĉiuj esperantistoj, kiuj lernigis Esperanton, sperte scias, kiel multe devas la lernantoj klopodi por funde koni la ĝustan kaj korektan uzadon de la ses esperantaj participoj en iliaj gramatikaj funkcioj (substantiva, adjektiva kaj adverbaj) nur pro tio, ke en la ĉefaj Eŭropaj lingvoj tute ne ekzistas tia riĉeco de participoj, kiun Esperanto posedas. La demando pri participoj estas jam en la ĝisnuna formo *sufiĉe komplika*, kial do plikomplikigi ĝin per la novaj kuntrigoj « amantas, amintas, k. c. »? Ĉu multaj lernantoj ne plendus, ke ne ekzistas tia prilaudita *simpleco* de Esperanto kaj forlasus ĝian ellernadon? Oni ne forgesu kiom la *akuzativo* kaj la *participoj* klopodigas la lernantojn de Esperanto, kiuj ne estas lertaj gramatikistoj.

La *internacieco* ne povas esti alvokita por la alpreno de tiu ĉi reformo. Ĉu en la ĉefaj Eŭropaj lingvoj ekzistas io simila al la uzado de la formoj « amantas », amintas, k. c.? Tute ne. Akceptante ilin, oni devigus, do, la esperantistojn konstrui la verbotempojn laŭ maniero tute kontraŭa al tiu, kiun kutimas uzi la naciaj lingvoj.

La *bonsoneco* ne gajnus ankaŭ per la pritraktita reformo. Ĉu oni povas aŭdi ion pli malagrablan, ol vortoj tiaj, kiel *tintintis*, *ordonotos*, *traktantas*, k. c.?

Inter la frazoj suprecititaj : « mi estas traleginta, korektinta kaj resendinta la tekston » kaj « Mi tralegintis, korektintis kaj resendintis la tekston » la unua ŝajnas multe pli belsona ol la dua. La finiĝo « intis » (ĝuste la plej bezonata) estas tre forĵetinda laŭ la eŭfonia vidpunkto. La plendo de la proponinto pri tio, ke Esperanto havas nur unu helpverbon, kaj ŝajnas malsupera al aliaj lingvoj havantaj du (aŭ pli) helpverbojn ne estas sufiĉe grava por devigi nin akcepti la reformon. Kiam ripetado helpas al *klareco* kaj al *simpleco*, ĝi devas esti benata. La celo de lingvo devas esti esprimi *klare*, *simple* kaj *precize* kaj ĉio cetera devas cedi antaŭ la ĉefaj ecoj de la esprimado. En la tekstoj de D-ro Zamenhof oni trovas tre elegantajn ripetojn de vortoj kaj aranĝoj, en okazoj kiam tiaj ripetoj ne estas tute bezonaj, kaj tamen, kiel mirinde bone sonas tiaj ripetoj! Ĉu por eviti ripetojn de radikoj oni devas forĵeti la uzon de afiksoj « *bela* kaj *malbela* », *kanti kanton* pri la espero », k. c.? Ne, tute ne, la *simpleco* estas centfoje preferinda al ripeteviteco!

Uzante la formojn « amantas », « amintas » k. c., oni perdus tiujn belajn kaj majestajn vortaranĝojn, kiuj rezultas kiam oni lerte intermetas amason da vortoj inter la helpverbo kaj ĝia responda participo.

Sed lasante flanken la aferon, ĉu la propono pri la participa sufikso antaŭ verba finiĝo estas aŭ ne utila kaj alpreninda, ni devas prezenti la

jenan demandon, kiu estas meditata kaj serioze respondinda; ĉu la Internacia Lingva Komitato *povas decidi* la alprenon de la ripetita propono? Ni kuraĝe kaj sensanceliĝe respondas; *tute ne!*

La fondo kaj la funkciado de la Internacia Lingva Komitato ripozas sur principo, kiun en la lasta tempo oni ĉien predikis: *la netuŝebleco de la Fundamento de Esperanto*. La proponita reformo celas aliigi la *Fundamenton* en ĉiuj ĝiaj partoj: en la *gramatiko* ŝanĝante la konjugacion, en la *Ekzercaro* nuligante ĉiujn ekzemplojn, kiuj enhavas malsimplajn verbotempojn, kaj en la *Universala Vortaro* aliigante la signifon de la verbaj finiĝoj (aŭ tempiloj) *as, is, os, k. c.*, ĉar la aŭtoro de la propono ne sufiĉe pruvis ke ekzemple *am'* kaj *amat'* estas en tute samaj kondiĉoj por konjugaciigi, kaj aliparte la aludita reformo postulas, ke *as* — signifas *estas, is* — *estis, k. c.*

La subskribontoj ne opinias kiel Sro Moch pri la respondo de D-ro Zamenhof presita en « La Revuo », koncerne la pritraktitan proponon, sed tute male. La unuaparto de tiu respondo montras nur la delikatecon de nia Majstro, kiu volis lasi la Lingvan Komitaton en plena libereco por senbare diskuti kaj juĝadi la aferon. La dua fina parto klare esprimas la privatan opinion de D-ro Zamenhof kontraŭa al la reformo.

Se la Internacia Lingva Komitato decidus la uzadon de la formoj *amantas, amintas, k. c.*, la bonaj esperantistoj, kiuj antaŭ ĉio amas la certecon de la triumfo de Esperanto, prave protestus kontraŭ reformo, kiu estas sendube la plej radikala el ĉiuj, kiujn oni proponis en la lasta tempo. Krom tio, la aŭtoritateco de la Internacia Lingva Komitato disfalus teren. Kion ja oni povus estonte atendi de komitato, kiu anstataŭ gardi la netuŝeblecon de la *Fundamento de Esperanto*, respektigante kaj respektigigante ĝin, profitis la unuan okazon por ĝin atenci?

Oni ne forgesu la sperton de 1894. Tiam nia Majstro mem, post profunda esploro, proponis la plej taŭgajn reformojn por Esperanto: la plejmulto de Esperantistoj voĉdonis pri la akcepto de nenia reformo. Ĉu tia decido montris malkonfidon pri la kompetenteco de nia Majstro kaj pri la taŭgeco de liaj proponitaj reformoj? Ne, tute ne, la tiamaj Esperantistoj preferis konservi la saman lingvon, ĉar en la akcepto de reformoj ili vidis danĝeron, kiu certe povus por ĉiam detrui la prosperan vivadon de Esperanto.

Ni estu saĝaj kaj singardaj en tiu ĉi ekstreme grava kaj delikata afero. La Hispanaj komitatanoj plej energie kontraŭstaras al la akcepto de la formoj *amantas, amintas, k. c.*, kaj kredas sia plej elementa devo averti ĉiujn ceterajn kolegojn pri la timinda danĝero kiu rezultus de la pritraktita reformo kiu kondukus nin en novan vojon, kies komenco

estus la malsukceso de la Internacia Lingva Komitato kaj kies fino eble estus la morto de Esperanto.

VINCENTO INGLADA.

En Murcia (Hispanujo) la 13-an de julio 1907,
Je la nomo de la Hispanaj membroj de la Lingva Komitato:

RICARDO CODORNIU.

C. Respondo de S^{ro} Peltier.

Estimata Sinjoro Prezidanto de la Lingva Komitato.

Miresendas al vilapresprovaĵon « *Pri la participa sufikso antaŭ verba finiĝo.* » Sur ĝi mi skribis kelkajn rimarkojn. Sed mi volus pri la sama temo fari proponon.

I. — Mi konsentas kun la raportanto, ke la formoj « amatas, amatis, amintis », estas *uzeblaj* sen ia rompo en la lingvo. Mi tamen ne voĉdonas por la akcepto de ili, ĉar :

1) Ili estas tro *analizemaj* kaj, protio, kontraŭ la ĝenerala evolucio de lingvoj, kaj kontraŭ la ĝenerala evolucio de Esperanto.

2) Ili *tio komplikas la verbon* Esperantan, ĝis nun mirinde simplan. Tiuj, kiuj faris kurson pri Esperanto bone scias, kiel malfacila estas jam instrui la korektan uzadon de *ata* kaj *ita*. Fakte nur malmultaj Esperantistoj ilin uzas korekte. La afero estos ankoraŭ pli terura, kiam oni devos instrui la diferencojn inter : amatas, amatis, amitas, amitis, amintas, amintis! kaj eble amotas, amotis, amontas, amantis.

II. — Mi pensas, ke, almenaŭ por la verbo aktiva, oni povas eviti tiujn malfacilaĵojn, kaj tamen esprimi la nuancojn verbajn, per jena rimedo :

La kunmetitaj formoj : (mi estas aminta. mi estis aminta) estas formataj per la helpa vorto : ESTINTE, kiu signifas klare : *en la estinta tempo.*

VERBO (aktiva).

Indikativo

Estanta : mi amas.

Estinta : mi amis.

Antaŭa-Estinta

aŭ

Pluskvamperfekta

Estonta : mi amos.

Antaŭa-Estonta : mi estinte amos (mi estos aminta).

{ mi estinte amis = { mi estas aminta
mi estis aminta

Kondiĉa modo.

Estanta : mi amus.

Estinta : mi estinte amus (mi estus aminta).

Ordona modo.

Estanta : amu.

Estinta : Estinte amu (estu aminta).

Infinitivo.

Estanta : ami.

Estinta : Estinte ami (esti aminta).

Noto : Simila rimedo estis proponita de D-ro Zamenhof en la projekto de reformo de 1894 (Hepanta vorto : *pasate*).

Participoj.

Amanta.

Aminta.

Amonta.

Se nun oni konsentas, ke la radiko de l'pasiva verbo estos : la radiko aktiva (am) + la sufikso participa pasiva de l'estanto (at), ni ricevos verbon pasivan tute simplan, en kiu oni ne ŝanceliĝos plu inter ata, ita, ota. — Jen la modela :

VERBO (pasiva).

Indikativo.

Estanta : mi amatas.

Estinta : mi amatis,

Antaŭa-Estinta : mi *estinte* amatis

} mi estas amita
mi estis amita

Estonta : mi amatos.

Antaŭa-Estonta : mi *estinte* amatos. (mi estos amita)*Kondiĉa modo.*

Estanta : Mi amatus. (mi estus amata).

Estinta : Mi estinte amatus (mi estus amita).

Ordona modo.

Estanta : amatu.

Estinta : Estinte amatu.

Infinitivo.

Amati.

Estinte amati.

Participoj (sen ŝanĝoj.)

Noto. Tiuj modeloj ne estas liveritaj kiel *trudataj*, sed kiel *uzeblaj*.

2-an de julio 1907.

E. PELTIER.

D. — *Respondo de S^{ro} Wackrill.*

London, la 27-an de Julio 1907.

Estimata Sinjoro Prezidanto,

Estas dezirinde, laŭ mia opinio, konstati la principon, ke la participa sufikso antaŭ verba finiĝo estas *permesata*.

Sed mi forte konsilas, ke la demando : ĉu *as, is*, k. t. p. devas signifi *estas, estis*, k. t. p., estu prokrastata ĝis kiam oni estos libere diskutintaj la kialon kaj la konsekvencon de tiu lingva ŝanĝo. Al la diskuto mi volus alporti la jenan noton.

Skribante pri la demando : ĉu la verbaj finiĝoj pli aŭ malpli frue ricevos la signifon de la verbo « *esti* », D-ro Zamenhof certigas nin, ke « ĝis nun ili tiun ĉi signifon *ne* havas » Ni do esploru, kian rezultaton ni atingos en okazo se la L. K. decidus enkonduki la diritan ŝanĝon.

Se oni konstatos, ke (p. e.) la finiĝo « *is* » signifas ĉiaokaze « *estis* », tiam ni trovos, ke « *mi frapis* » signifas : « *mi estis frap* » kaj tio, sen plua klarigo, ne havas difinitan signifon. « *Frap* » en tia situacio povas esti difinita por signifi, pro mallongiĝo, ĉu « *frapa* » aŭ « *frapanta* », sed ĝi ne povas havi (laŭ la ordinara akcepto de « *mi frapis* ») la signifon de « *frapo* », « *frapinta* », « *fraponta* », « *frapata* », « *frapita* », nek « *frapota* ».

Ĉu do estus fareble konstati, kiel principon, ke la finiĝoj « *as* », « *is* », k. t. p., staras ĉiam por « *estas* », « *estis* », k. t. p., kune kun subkomprenata finiĝo « *a* » aŭ « *anta* »? Mi kredas, ke la finiĝo « *anta* » devus esti forigata se la regulo celus regi tiajn vortojn, kiaj *lacas, riĉas, pravas*, lasante nur la finiĝon « *a* » kiel konstantan klarigon de la mallongiĝo. Sekve, se oni uzus la esprimon « *mi patras* », ĝi ne povus signifi : « *mi etas patro* », sed nur « *mi estas patra* ».

El tio sekvas, ke en la lingvo Esperanto ekzistas nenia verbo krom unu sola : la verbo « *esti* ». Ĉiu alia tiel dirita « verbo » estas ĝustadire verbaĵo konsistanta el ia vorto kun subkomprenata adjektiva finiĝo kaj en kunmeto kun ia parto de la verbo « *esti* », kiu en tiaj okazoj prenas mallongan formon. De tiu mallonga formo la plena konjugacio estas : *as, is, os, i, us, u, ant, int, ont, at, it, ot*.

Sekvas ankaŭ, ke en la lingvo Esperanto ne ekzistas transitivaj verboj. Kiam ni diras : « *li aĉetas panon* », la finiĝo « *n* » tie staras ne ĉar ni havas transitivan verbon « *aĉet* », kiu postulas post si akuzativon, sed nur por signi, ke por oportuno ni forlasis ian prepozicion. La plena frazo estas : « *li estas aĉeta por pano* » aŭ « *li estas aĉeta je pano* », kaj tio fariĝas « *li estas aĉeta panon* », kaj fine « *li aĉetas panon* ».

Ĉu tio ĉi estas vera lingva ŝanĝo? Al mi ŝajnas, ke ĝi ne estas lingva ŝanĝo, sed nur ŝanĝo de vidpunkto. Ĉu ĝi efikos malbone sur la klarecon de la lingvo? Ne, ĉar la ĉefa celo de ĉiu aparta uzanto de la lingvo estas, ke ĉiu alia komprenu lin. La troa koncizeco, la ŝercema embarasfarado, la ĉagreniga eksperimentado. ĉiuj nepre okazos; sed ĉiuj egale pli aŭ malpli frue nepre cedos lokon al la klareco.

Petante, ke vi uzu laŭ via bontrovo tiun ĉi leteron, intencitan por dissendo al niaj kolegoj, mi prezentas al vi, Sinjoro Prezidanto, la certigon de mia plej alta estimo.

ALFERD. E. WACKRILL

E. — Respondo de S^{ro} Zakrzewski

La formoj, proponitaj de S^{oj} Twombly, Lowell kaj Harvey, kaj samtempe de S^{ro} Moch, havas unu bonan flankon: ili estas pli mallongaj kaj en kelkaj okazoj (sed tute ne en ĉiuj) pli oportunaj ol la ĝisnunaj duvortaj formoj de la tempoj kunmetitaj. Sed, bedaŭrinde, en tiu ĉi afero, kiel ĉie, ekzistas ankaŭ kontraŭa flanko de la medalo, kiun ni devas konsciencie pripensi antaŭ nia decido. Jen estas kelkaj punktoj, sur kiujn mi permesas al mi turni atenton de niaj komitatanoj.

I. Antaŭ ĉio, ŝajnas al mi, ke la rimarko de D^{ro} Zamenhof, ke « *Oni povas enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se as, is, us, i... signifus estas, estis, estus, esti..., kian signifon ili ĝis nun ne havas...* » (La Revuo, 1907, n^o 8.), estas tute gusta. Mi ne povas konsenti kun la opinio, ke tiu ĉi rimarko estas nur « *Konfuzo, kiun nia majstro tuj konfesos, kiam oni estos rimarkigintaj ĝin al li...* » La participaj formoj, kiel verbaj formoj, havas sendube tute klaran kaj precizan tempan signon en siaj finiĝoj. Sed en tempoj kunmetitaj, — necesecon de kiuj tiel prave kaj bone defendas S^{ro} Moch, — la tempaj signoj de la participoj havas iom alian signifon ol similaj signoj de la helpa verbo « *esti* ». Ili havas nome karakteron *rilatan*, t. e. ke ili ne montras la efektivan, realan tempon de la agado aŭ stato, kiun ili esprimas, sed nur *la rilaton de tiu ĉi tempo* al la tempo de la ĉefa verbo, — ili montras nur ĉu la esprimata agado estas *samtempa, antaŭa aŭ ankoraŭ ne efektivigita* en la tempo, montrata per la helpa verbo. La ĉefan rolon en tiu ĉi rilato havas do la helpa verbo, kiun pro tio ni metas sur la unuan lokon, ĉar tiel la senco fariĝas klara kaj preciza. *Se do la finiĝoj as, is, os, u, i... ne ricevos la signifon estas, estis, estos, estu, esti... la proponitaj formoj ne estos precizaj, ĉar la participaj finiĝoj solaj ne sufiĉas por difini tion, kio devas esti difinita, t. e. la tempon absolutan,*

II. Aliparte, se ni akceptus la proponatajn formojn, kaj se ni ne volus fari la unuan en Esperanto escepton, ŝajnas al mi, ke *ni estos nepre devigitaj akcepti, kiel necesan sekvon, ĝuste tion, kion S^{ro} Moch tute prave nomas « vera ŝanĝo de la lingvo, malaprobinda, neutila kaj malbela »*, t. e., ke la finiĝoj *as, u, i...* ricevos signifon *estas, estu, esti...*

La ĝenerala regulo de la esperanta vortfarado, havanta ĝis nun nenian esceptojn, estas, ke ĉia parto de vortoj kunmetitaj ricevas memstaran sencon kaj signifon, rajtigantan ĝian uzadon kiel apartan, sendependan vorton. Eĉ sufiksoj aŭ prefiksoj, kiel *malo, ilo, eco, inda, estro, edzo...* aŭ ankaŭ kunmetitaj unu kun alia, sen ia alia radiko : *indeco, ebleco, estraro, ilaro, idino...*, fariĝis vortoj memstaraj. Akceptinte do formojn : *amintas, amantas, amontos*, ni jam ne povus malpermesi la uzadon de formoj analogiaj kiel : *mi pravas, mi ruzas, mi necesas, mi bonas* (= *mi estas prava, ruza, necesa, bona...*), aŭ eble eĉ de novaj konstruaĵoj kun substantivaj aŭ pronomaj, adverbaj k. c. radikoj kiel : *mi profesoras, mi botistas* (= *mi estas profesoro, botisto...*), aŭ eble : *mias profesoro, vias botisto* (1)! » Tiuj ĉi lastaj formoj estus tiam tute rajtigitaj.

Se do ni trovas, ke ili ne estas dezirindaj, — ke oni ne devas forĵeti el nia lingvo kvazaŭ « *senutila balasto* » tiel karakteran kaj vere internacian radikon, kiel *est*, — ni ne povas akcepti la priparolatan proponon.

III. Ĉu iu jam provis ekzameni atente la tutan kolekton de novaj formoj, kiujn promesas al ni la priparolata projekto. Jen estas plena aro da tiuj ĉi novaj tempaj formoj de la verbo *ami* :

Amantas, amantis, amintas, amantos, amintis, amintos, amontos, amontas, amontis, amantus, amintus, amintu, amontus, amontu, amantu, amanti, aminti, amonti... kaj la pasivaj : *amatas, amitas, amotas* k. t. p.

Tre malfacile distingeblaj ili estas, kontraŭe tre facile konfuzebaj (*amintos* kaj *amontis*, *amintas* kaj *amantis...*). Sed tiuj ĉi estas ankoraŭ sufiĉe belsonaj. Sed ni prenu verban radikon iom malpli simplan, ekzemple la verbon *distingi* :

(1) Ne miru, leganto! En lingvo Pola ni havas similajn esprimojn : *dobryŝ* = *vi estas bona* (*dobry* = *bona*, *vi estas* = *jesteŝ*, el kio restas nur la sola finiĝo *ŝ* kaj aliĝas al la adjektivo); *jam Bog*, *jam ojciec* = *mi estas Dio*, *mi estas patro* (*ja* = *mi*, *Bog* = *Dio*, *ojciec* = *patro*; *mi estas* = *jestem*, kaj la finiĝo *m* aliĝas al la pronomo; esperantigita laŭvorte : *jam Bog* = *mias Dio*, t. e., ankaŭ sen la « neutila balasto » *est*, anstataŭ *ja* (*jeste*) *m Bog... ty* (*jeste*) *ŝ dobry...* Kiel en la ekvacio sur la p. 11. eĉ kun adverboj : *pokim dobry* = ĝis mi estas bona (*ĝis* = *poki*), au kun konjunkcio : *wiem. res dobry* = *mi scias, ke vi estas bona* = *keas bona*.

Jen, en Pola lingvo, tempa signo kunmetita al konjunkcio : *wiem, reŝ dobry* = *mi scias, ke vi estas bona* : *wiem* = *mi scias*, *re* = *ke*, *ŝ* = restajo de la verba formo *jesteŝ* = *vi estas*, *dobry* = *bona...* laŭvorte : *mi scias, keas bona*.

Distingantis, distingintas, distingontas, distingintos, distingintus, distingintis, distingintus...

Aŭ *renkonti* : *renkontintas, renkontintis, renkontantis, renkontontos, renkontontas, renkontontus, renkontintos...*

Mi permesas al mi demandi, ĉu tio ĉi estas la « *viglaĵ, bonsonaj kaj elegantaj* » formoj, kiuj devas anstataŭi la ĝisnunajn « *multepezajn kaj malbelajn formojn* » de la tempoj kunmetitaj? Mi konfesas, ke mi tiun « *bonsonecon* » kaj « *elegantecon* » tie ĉi tute ne vidas.

Anstataŭ tri participaj formoj, facile kompreneblaj kaj remomorigeblaj, kaj ses formoj de la verbo *esti*, ni havos do *tridek ses* (*dek ok* aktivajn kaj *dek ok* pasivajn) kunmetitajn formojn, kaj la signifojn de ĉiu el ili ni devus ellerni aparte, ĉar ili ne estas kompreneblaj per si mem.

Se en la unuaj gramatikoj esperantaj oni tute ne parolis pri la tempoj kunmetitaj, la kaŭzo estis, ke ili aperis laŭ bezono de skribantoj per si mem (kvazaŭ « *generacio spontanea* »!), ĉar la duvortaj formoj kun la verbo *esti* estas kompreneblaj sen ia klarigo. Ilia signifo respondas efektive al la signifo de diversaj formoj de la verbo *esti* + tiu aŭ alia participo. Oni eĉ povas diri, ke la verbo *esti* tute ne havas tie ĉi *helpan* rolon kiel ekz., la verbo *havi* en ligvoj franca, angla aŭ germana, kiu ŝanĝis sian signifon (« *J'avais cru* », « *Y have loved* »), ĉar ĝi konservas sian radikan sencon. Ni tuj komprenas « *mi estas aminta* », « *la domo estas konstruata aŭ konstruita...* k. c., kiam ni konas la signifon de la participaj finiĝoj *anta, ota*, k. c. Sed ĉu ni povas diri saman pri: *renkontantis, renkontintas*? ĉu ili estas kompreneblaj per si mem al tiu, kiu konas nur la ĉefajn regulojn de la gramatiko Esperanta?

Ni prenu ankoraŭ la konatan frazon de S^{ro} Cart : *Kiam mi estis manĝonta fison, mi estis tre kontenta; kiam mi estis manĝanta ĝin, mi estis malpli kontenta; kiam mi estis manginta ĝin, mi estis tute malkontenta car mi malsaniĝis!*...

« *Kiam mi manĝontis fiŝon mi estis tre kontenta; kiam mi manĝantis ĝin mi estis malpli kontenta, kiam mi manĝintis*, k. c. Bonvolu kompari tiujn ĉi du frazojn kaj demandi al ia sperta instruisto, kia el ili estas pli facile komprenebla kaj instruebla?

En la duvortaj formoj la unua verbo montras tuj la ĉefan tempon, ni bezonas nur atenti la partecipan finiĝon kaj por tio ni havas sufiĉe da tempo. Sed en la vortoj « *manĝantis* », « *manĝintis* », « *manĝontis* », la du tempaj signoj estas tiel proksimigitaj, ke ni havas nur malgrandan eron da tempo por distingi ilin. Kvankam la rapideco de nia kombinaĵo

kapableco estas granda, ĝi tamen postulas iom da tempo, kaj oni ne devus plimalgrandigi ĝin (1).

IV. Ŝajnas al mi ankaŭ, ke, almenaŭ por kelkaj formoj, la duvortaj tempoj estas multe pli logikaj, t. e., *ke ili pli bone respondas al la vera senco*. Ekzemple, en la formoj kun participoj estontaj, kiam mi diras : « *mi estis manĝonta* », — kvankam la verbo mem estas « transira », — mi montras nenian agadon, mi esprimas nur staton, en kiu mi *intencis manĝi*.

En la kondiĉaj aŭ ordonaj manieroj estas ankaŭ pli oportuna, ke *la moda signo staru antaŭ la signo de la tempo rilata (mi estus dirinta, estu faranta...)*

En pasivaj manieroj : la frazo « *la domo estos konstruata, konstruita aŭ konstruota* » ŝajnas al mi pli klara ol « *la domo konstruatos, konstruitos aŭ konstruotos* », — aŭ la frazo « *Esperanto en jaro 1887 estis ankoraŭ aperonta* » estas pli oportuna ol « *Esperanto aperontis* », kio montras kvazaŭ jam efektivigitan faktan, dank al la finiĝo *is*.

Ĉu tamen mia impresio devenas nur de ĝisnua kutimo? — Mi ne pensas.

En ĉiuj similaj okazoj ĉiuj lingvoj uzas manierojn kun helpaj vortoj. Kaj krom tio oni povas rimarki ankaŭ, ke la evolucio de niaj vivaj lingvoj progresas precipe en analiza, ne en sinteza direkto.

V. Ankoraŭ unu rimarko : laŭ mia opinio ni jam havas en Esperanto tute sufiĉe da vortoj kunmetitaj kaj jam hodiaŭ multaj « kunmetaĵoj » eĉ por spertaj esperantistoj estas ne tuj kompreneblaj ĉe la unua rigardo aŭ aŭskulto (« *Defluilego* », « *enŝipiĝejo* », « *ventumilo* », « *montegaro...* »). Ne pligrandigu ilian nombron!

Precipe niaj verboj havas jam ofte prefiksoj kaj sufiksoj : *ig, iĝ, dis, re, ad...* Manieroj kiel *rememorigantis, rememorigintas, rememorigontus, rememorigintus* — aŭ : *disbutonumantis, disbutonumintas*, k. c., prezentas enigmojn ne facile divenotaj.

VI. Mi entute konsentas kun S^{ro} Moch, ke la lasta decidanta vorto en tiu ĉi afero, — kiel en ĉiuj, rilatantaj al Esperanto, kiel lingvo, — apartenas nur al D^{ro} Zamenhof. Sed, se eĉ ĉiuj niaj komitatanoj konsentus kun tiu ĉi opinio, — mi ankaŭ scias tre bone, ke nia majstro estas la plej modesta homo, kiun mi iam renkontis en mia vivo ; mi scias, ke li

(1) Jam la finiĝoj *as, os, us* en la elparolado de kelkaj nacioj estas ofte tiel similaj, ke ili fariĝas malfacile distingeblaj kaj oni devas bone aŭskulti la parolanton por kompreni lin. Tio ĉi ne okazas kun Francoj, inklinaj akcenti la lastajn silabojn ; sed, ekzemple, la Rusoj akcentas kontraŭe tre forte la antaŭlastan silabon kaj tute « manĝas » la lastan : oni aŭdas « *mi ams* » ne sciante, ĉu tio ĉi signifas « *mi-amas,* » « *mi amos* » aŭ « *mi amus* » — des pli ke laŭ nacia kutimo ili elparolas *o* kiel *a*. Ni do ne devas pligrandigi similajn malfacilaĵojn.

ne amas altrudi sian opinion al iu ajn, — ke li estas inklina al ĉiaj cedioj kaj precipe en okazoj, similaj al la nuna, kiam la prezentantoj estas personoj tiel meritplenaj, ŝatindaj, fervoraj, eĉ ĉefaj kondukantoj de nia esperanta movado! Mi do timas antaŭ ĉio, ke — kia ajn estos la maniero de la decido : voĉdonado de komitatanoj aŭ opinio de D^{ro} Zamenhof, — *ne estu rajtigitaj la ambaŭ formoj* : ĝisnuna kaj projektata, laŭvole de ĉiu aparta esperantisto.

Simila decido estus, laŭ mia opinio, la malplej dezirinda — des pli ke, laŭ la ĝusta opinio de S^{ro} Moch, la tempoj kunmetitaj estas viva, grava, utila kaj necesa formo en nia lingvo. Kiam la reguloj de ilia uzado estos precizigitaj kaj kiam ĉia deklino de tiuj reguloj estos rigardata kiel eraro, tiam malaperos sendube tiu kontraŭstaro, kiun ili nun renkontas ĉe kelkaj aŭtoroj.

ADAM ZAKRZEWSKI.

(ZAKŜESKI).

8. VII. 1907. Varsovio. (Polujo).

F. — Respondo de A. Zinoviev

Pli ol unu fojo mi logiĝis proponi kaj defendi la leĝecon de formoj « *amatas, amatis* ». Mi ne faris tion pro timo ke la propono povus esti konsiderota kiel ŝanĝo aŭ novigo, timiga por tiom da esperantistoj politikemaj, kvankam multo da novigoj estas neevitebla en onto.

Sekviĝe : Salutante la iniciativon notitan sur la unua paĝo de ĉi prezenta dokumento, *mi voĉdonas por ĝi*, kaj ankaŭ aliĝas al alta logiko de S^{ro} Zamenhof kiu lasas al kompetenteco de la L. K., la finan decidon pri ĝia adoptado.

Ĉar S^{ro} Zamenhof, laŭokaze, retuŝis demandon pri la havigo sufiks-ojn *as, is, os...* je signifo de helpverbo Esperanta (enkies sistemo afiks-oj povus ludi rolon de radikoj : regulo teoria, kaj uzaĵo ĉiam praktikata) mi starigas kaj defendas ĉi tiun havigon, eĉ se ĝi ne troviĝas en la demandprogramo de la L. K.

(La vorto *estas*, kun du fermitaj silaboj finiĝantaj per la fajfa *s*, multe ripetata, iĝas ege malagraba al orelo (simile al la konjunkcio *kaj*). Dum la Ĝeneva kongreso, en la paroladoj de kelkaj oratoroj tiu *estas* ŝajnis al mi vere incitema. Interne mi, mi petis tiujn oratorojn eligadi almenaŭ la komencan *e*).

* * *

Kun tuta mia respekto al opinioj de la altestimata raportisto de la ĉi traktata demando mi neniel povas aniĝi al lia starigado, formulita per li

ankoraŭ en jaro 1905-a, ripetata nune, kaj proklamanta S-ron Zamenhof posedulo de helpa internacia lingvo, kun potenco fari decidojn devigaj por la esperantistaro. Mi kontraŭstaras je tiu opinio : 1^e, ĉar S^{ro} Zamenhof, tre saĝe, multfoje deklinis de si tiun rolon; 2^e, ĉar ĉiam kaj ĉie estas pli certa kaj profita serĉi aŭtoritaton en kolektiveco ol ĉe unu homo; 3^e, ĉar ĝenerale estas nerekomendinda nepre ligi inter si respekton kaj potencon. Por pruvi teoremon de Newton aŭ de Taylor mi tamen ne iros haviĝi je ilia aŭtoritato, kvankam, la teoremoj devenas de ili.

Se poveco aŭ rajteco de S^{ro} Zamenhof kiel 1/94 —a parto de la L. K., ŝajnas granda tro malega (kvankam tie ĉi ne aferas pri ia komerca entrepreno) mi volonte voĉdonus ke la numeratoro de tiu frakcio estu multiplikita je kelka entjero (5, 10, 12...)

*
* *
*

Mi permesas al mi lokigi tie ĉi mallongan rezonadon pri la pastempoj en Esperanto al kiu la L. K., donos, povas esti, iom da atento.

S^{ro} Zamenhof faris gravan ellason (forgeson) doninte en sia unua gvidlibreto nur unu pastempon al verbo. Poste aliaj, kaj li mem, korektis, per forto de neceseco, tiun eraron, ekuzante la verbon *esti* kiel helpa, kaj enkondukante tempojn kunmetitajn. Mi havas konvinkon ke Zamenhof ne antaŭvidis tiun kunmetiĝon kiam li estis eldonanta sian unuan broŝureton.

La kunmetitaj tempoj, kies logikecon mi neniel rifuzas, estas ne-disputige longaj kaj mallertaj. Mi dubas ke al iu ajn plaĉu, ekzemple, tiu formo : « *estis estinta* », kiun tamen oni vidis en literaturo Esperanta. Oni ne povas malhelpi uzi tiun kunmetaĵon al kiuj volas ĝin uzi : ili estas legaj..., sed liberiĝi nin de ili estus agrabla.

Nur du tempoj estas esence postulataj en la pasinto : tempo por ago ankoraŭ neplenumita, *neperfekta*; kaj tempo por ago jam plenumita, *perfekta*. Tiuj formoj respondas al ideoj *de emo*, kaj *de atingo*. Ege konforme al tuta spirito de la konstruo de Esperanto estus signigi ilin per afiksoj. Por la perfekta pastempo ni havas sufikson *is*. Tute nature estus havigi la neperfektan pastempon je sufikso *es*. *Mi fares* tradukus la formojn : *je faisais, I did, Ich machte, ja delal, mi estis faranta*. — *Mi faris servus por j'ai fait, I have done, Ich habe gemacht, ja sdelal...* (1).

(1) En lingvo Rusa ĉi tiuj formoj estas aparte reliefe malsamitaj.

La formoj: *fareta*, malsimilema al *farinta*, kaj *fareta*, nesama kun *farita*, estus tute naturaj kaj utilaj.

Kompreneble estas ke tia, ŝajnas plej simpla kaj plej bela solvo de la demando pri tempoj pasintaj ne estus nuligonta formojn ĝis nun en uzado kaj tiujn traktatajn en tiu ĉi raporto.

Nur principoj devas esti malmultaj; multegeco da formoj-derivaĵoj konsistigas, male, la riĉecon de lingvo.

A. ZINOVIEV.

Le Palus-Plouha (Côtes du Nord) 28. VI. 1907

IV. — Raporto pri la ricevitaj respondoj.

Pri la *Participa sufikso antaŭ verba finiĝo*, la prezidanto de la Lingva Komitato ricevis 51 respondojn.

Plene aprobis la proponon S^{roj} *Ahlberg, de Beaufront, Christaller, Gustafsson, Lambert, Méray, Michaux, Moch, S^{ivo} Münster, S^{roj} Renard, Simon, Skeel-Gjorling, Twombly, Uitterdyck, Wackrill, Zinoviev*, sume 16 komitatanoj.

4 membroj petas, ke la demando estu prokrastata. Nome, S^{ro} *Ebner* « entute konsentas, sed opinias ke la propono devas esti prokrastata ĝis 4-5 jaroj ». S^{ro} *Costa e Almeida* kaj F^{ino} *Schafer* petas prokraston, ĝis kiam tiuj formoj estos enkondukataj de la natura evolucio de nia lingvo. Simile S^{ro} *Krikortz* petas prokraston, ĝis « kiam sperto, farita ĉe la instruado esperanta, estos montrinta ke ili ne malfaciligas la lernadon ».

S^{ro} *Gallois* respondis, ke oni povas uzi la proponitajn formojn, sed ke li preferas la malnovajn. Same S^{ro} *Ellis*, kiu konkludas, ke li « restas neŭtra ».

S^{ro} *Mybs* proponas ke, en la gramatikoj, oni montru la proponitajn formojn per malgrande presitaj rimarkoj, kiel uzeblajn nur en telegramoj kaj eble en poezio. S^{ro} *Morin* opinias, ke ili estas akceptindaj nur en la skribaĵo, kiel mallongigoj, same, kiel oni skribas « K. c. », « k. t. p. » S^{ro} *Vargas* opinias, ke ia ajn plibonigo devas esti prokrastata, kaj ke, se oni akceptos tiujn formojn, oni devos uzi ilin nur en komercaj letéroj kaj en la konversacio.

S^{ro} *Peltier* opinias ke la proponitaj formoj estas « uzeblaj », sed li voĉdonas kontraŭ ilia aprobo, kaj proponas aliajn.

Plene malaprobis la proponon S^{roj} *Bagnulo, Beauchemin, Benoît, Borel, Bourlet, Capé, Codorniu, Cejka, Dor, Inglada, Jamin, Kühnl, Lengyel, Matton, Meier, Mudie, Nylèn, Pollen, Schraeder, Talmey, Zakrzewski*, — sume 21 komitatanoj.

Plie, 2 membroj, S^{roj} *Sam. Meyer* kaj *Millidge*, malaprobas, tiujn formojn se D^{ro} Zamenhof ne rekomendos ilin.

S^{ro} *Busutill* « akceptas la klarigojn donitajn de D^{ro} Zamenhof en la *Revuo*. »

S^{ino} *Junck* respondis : « Ĉion, kion la kara Doktoro montros al ni *uzebla*, aŭ *dezirata*, ni uzos kaj faros, ne pli, aŭ pli malmulte, ĉar la lingvon elpensis li — ne ni. »

Verkis speciale gravajn raportojn : S^{ro} Zinoviev, por la propono, kun aldono pri finiĝo *es*; S^{ro} Wackrill, ankaŭ favore, kaj pri la senco de la finiĝoj *as*, *is*, *os*; S^{roj} Borel, Inglada, Peltier kaj Zakrzewski, kontraŭ. S^{ro} Peltier aldonis proponon pri la formado de kunmetitaj tempoj per la helpa vorto *estinte*.

Tiuj raportoj estas presitaj pli supre, laŭ alfabeto vico.

Resume, la propono ŝajnas ĉu malbona, ĉu antaŭtempa, al la plimulto de la respondintaj komitatanoj, kaj estas do malakceptota. Cetere, la subsigninto mem de unu el la leteroj, kiuj ĝin enkondukis, fortiras, pro tiu konstato, kaj pro la gravaj motivoj prezentitaj de S^{ro} Zakrzewski, sian propran subsignon, opiniante ke nenia novaĵo devas esti enkondukata, se ĝi ne estas akceptata, jam de l'komenco, de plimulto sufiĉe granda por formi kvazaŭ unuanimecon. Tia disciplino estas la ĉefa kondiĉo de nia venko.

GASTON MOCH.

IV. — Konkludo,

La Lingva Komitato malkonsilas la uzon de kuntiritaj verbaj formoj, konsistantaj el participa sufikso antaŭ verba finiĝo.

La prezidanto :

EMILE BOIRAC.

ENHAVO

Enkonduko	pg. 9
Letero de S ^{roj} Twombly, Lowell, kaj Harvey	9
Letero de S ^{ro} Moch	10
Respondo de S ^{ro} Borel	14
Respondo de S ^{ro} Inglada	15
Respondo de S ^{ro} Peltier	18
Respondo de S ^{ro} Wackrill	20
Respondo de S ^{ro} Zakrzewski	21
Respondo de S ^{ro} Zinoviev	25
Kaporto pri la ricevitaĵoj	27
Konkludo	28

PRI LA PARTICIPA SUFIKSO

ANTAŬ VERBA FINIĜO

ERAROJ

Paĝo	9-a	titolo	<i>anstataŭ :</i>	<i>legu :</i>
	9-a	linio 3-a	finigo	finiĝo
	9-a	4-a	baj	kaj
	9-a	lasta	skribitaj	skribitajn
	9-a		dulsj	duloj
	10-a	11-a de malsupre.	estis	esti
	11-a	14-a »	tiu	tio
	11-a	13-a »	komplikigus	komplikigus
	13-a	12-a	kelpa	helpa
	13-a	20-a	tute	tuta
	13-a	3-a de malsupre.	tio	tiu
	14-a	14-a	passivaj	pasivaj
	14-a	17-a	kutimos	kutimiĝos
	14-a	6-a de malsupre.	fomoj	formoj
	15-a	11-a	velapukisto	volapukisto
	17-a	1-a	meditinta	meditinda
	18-a	17-a	tio	tro
	19-a	8-a	hepanta	helpanta
	19-a	16-a	modela	modelo
	20-a	13-a	etas	estas
	21-a	22-a	gusta	ĝusta
	21-a	24-a	rimarkigintaj	rimarkiginta
	23-a	20-a	ligvoj	lingvoj
	23-a	21-a	Y	I
	23-a	7-a de malsupre.	kia	kiu
	24-a	16-a	ĝisnua	ĝisnuna
	26-a	10-a	liberiĝi	liberigi